5-a Jaro. N-o 209 ¡APERAS SEMAJNE 4. Oktobro 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

LA FAŜISMA EDUKADO

Oni povas aserti, ke neniu ŝtato, escepte eble de la antikva Sparto, manifestis tian klopodon por disciplinigi siajn infanojn, kiel la faŝisma Italio. Eĉ en la plej malgranda urbo oni trovas en Italio nepre, en vicoj kvarope, taĉmenton da buboj aŭ junuloj, kiuj paradas, frapante la teron en tute militisteca takto. La komandoj, la plenumo de l' ordonoj, la direktado de l' ĉefoj estas tiuj de l' militistejo. Per unu gesto la trupo haltas, per unu gesto ĝi ekiras. Kaj oni tre ekzakte imitas la militistan ordon. La burĝidoj de ĉiuj nacioj amas soldat-ludi. Sed en Italio la seriozeco de l' fizionomio, la streĉiĝo de l' spiritoj kaj kvazaŭ malvarma volo diras, ke ne temas pri amuzo aŭ distro. Tiu ĉi engrupigita junularo ŝajnas plenumi riton. En nenio ĝi estas komparebla kun la skolta movado aŭ la grupiĝoj de nia laborista junularo (junaj pioniroj ktp.). Ĉe la faŝistoj ekzistas nur unu fera disciplino, al kiu obeas la infano: tiu de l' faŝismo. Ĉi lasta ja ne nur volas transformi la italojn de hieraŭ kaj hodiaŭ, sed ankaŭ laŭ siaj celoj formi la morgaŭajn. La faŝismo volas harmoniigi la edukadon de l' infano kun la nova ordo kaj la novaj principoj de l' nacio. Ĝi volas krei en la animo de l' junulo la volon rekonstrui Italion. El tiu ideo estis kreata la nacia organizo "Balilla". Tiu vorto jam estas plensignifa. Balilla estis infano, kiu en 1745 en Ĝenovo ĵetis ŝtonon kontraŭ la aŭstroj, la subpremantoj de la lando, kaj per tio donis la signalon por ribelo.

Tiu ĉi nacia organizo por "helpo kaj eduko fizika kaj morala de la junularo" konsistas el la propre-diraj "Balilla", entenantaj la infanojn de 8 ĝis 14 jaroj kaj el la "Antaŭ-gvardioj", la junuloj de 15 ĝis 18 jaroj. Kreita per leĝo de aprilo 1926 kaj aktivigita en marto 1927 la organizo hodiaŭ grupigas 600 000 Balilla kaj 400 000 antaŭgvardianojn. Tiu ĉi miliono da junuloj estas milite starigita, tra tuta Italio, en faŝismaj formiĝoj, laŭ romana modelo. Baze estas la okadra, aro el dek unu junuloj sub la komando de ĉefo; tiam venas la manipule konsistigita el tri okadr-oj, la centurie formita el tri manipul-oj, la kohorte el tri centurioj, kaj fine la legion (esp.: legio) kun tri kohortoj. La instruantoj de tiu ĉi armeo el infanoj kaj junuloj estas grandparte, precipe ĉe la antaŭgvardianoj, oficiroj aŭ sub-oficiroj de la faŝista milicio. Dekmilo da ili estas dungita por tiu ĉi laboro de militista edukado. La serĝento fariĝas la ĉefo de l'manipulo, la kapitano estas la centuriestro, la komandanto la "senior", la kolonelo, la konsulo. La liktoro, kiu portis en la antikva Romo la hakilon, enkadrigitan de faskoj estas nun la standard-portanto. Laŭ romana modelo ankaŭ estas enkondukita la saluto (brako levita) al la superulo, ĉefo de l' registaro, reĝo, naciaj koloroj. Unufoje dum jaro oni okazigas ceremonion nomatan "kolektiĝo faŝista", kiam la antaŭgvardianoj atingintaj la 18-an jaron, finas sian tempon de elementa instruiĝo. Ĝi estas komparebla kun antikva rito dum la klasika periodo de la Roma grandeco, kiam la junuloj ŝanĝis unuafoje la junulan per la vira robo (togo). Post solena promeso la antaŭgvardianoj estas enskribataj ĉe la partio, allasataj al la faŝista milicio, kaj ĉiu ricevas duoblan signon, civilan kaj militistan, registran karton kaj pafilon.

La organizo Balilla estas unu el la plej frapantaj kreaĵoj de l' reĝimo. Ĝi adaptiĝas kun fleksebleco al la diversaj evoluaj fazoj de l' juneco, kaptas jam la infanon de ĝia plej delikata aĝo kaj neniam plu lasas ĝin el la militistaj kadroj, kiuj kondukas ĝin ĝis ĝia akiro de civitana indeco. Vere ĝi grupigas principe nur volontulojn, por kiuj la patra konsento devas esti donata. Sed la preferoj kaj agrablaĵoj, kiujn la junularo profitas en la sportfako kiel en la elekto de kariero, estas tiaj, ke pli ol miliono da infanoj, proksimume triono de la junularo de Italio, ĝin partoprenas. Ĝi prezentas nuntempe veran monopolon de edukado por gimnastiko, sporto kaj "kulturo". La ŝtato konservas per ĝi kontrolon super la sinsekvaj generacioj de l' itala junularo. Ĉe ĝia kapo troviĝas centra komitato sub la kontrolo de Musolini mem; la prezidanto estas elektata el inter la plej superaj oficiroj de l' milicio.

La verko funkcias tre simple. La fizika edukado estas ŝtupigita laŭ gradoj. La Balilla nur faras malpezan gimnastikadon, dum la antaŭgvardianoj lernas iom post iom atletan sporton kaj fine estas militiste ekzercataj. Laŭ siaj gustoj ĉiu juna italo povas lerni pafi per fusilo[1], skermi, boat-veturi, ŝkii, eĉ ĉevalrajdi kaj aviadi.

---


[1] Infanteria pafilo.

Iom pri la kooperativa movado en Svedio

(Daŭrigo)

La centro: Kooperativa Asocio

La kunlaboro inter la lokaj societoj kaj la centro estas tre intima. La asocio estis fondata en la jaro 1899. Ĝi celis komence esti organo de kooperativa propagando kaj esti interligilo de la por la konsumsocietoj. Tamen estas inter la membraro ankaŭ la du kooperativaj asekuraj societoj: Vivasekuro: "La popolo" kaj por brulego, akcidentoj ktp.: "Kunlaboro". Vere ambaŭ tamen estas pli vere subsocietoj ol membroj. Laŭ la statutaro povas fariĝi membroj de la asocio ĉiu konsumsocieto, kiu havas bonan ekonomion kaj laboras laŭ statutoj konformaj al tiuj de la asocio.



La muelejo "Tri Kronoj" en Stokholmo

La plej alta decida potenco en la asocio estas la kongreso, kiu kunvenas ĉiujare. Al la kongreso povas ĉiu societo sendi delegitojn laŭ nombro, kiu respondas al la membraro de la societo. La kongreso kontrolas la priskribon de la agado de l' diversaj organoj en la asocio kaj pritraktas la demandon pri senŝarĝigo de respondeco. Sed ĝia plej praktika kaj grava agado estas diskuti la laboron por la evoluo de la kooperativa movado. Demandoj pri la ekonomio de la societoj, pri konkordo en la laboro, pri la loka produktado kaj aliaj problemoj de la societoj.

societoj. Tamen la asocio en la jaro 1904 komencis agentejan negoc-agadon kiel transdonanto al la societoj de negocoj, kaj iom post iom ĝi fariĝis tio, kio ĝi nun estas: centra societo de la konsumsocietoj. Fojon post fojo la privataj komercistoj provis per diversaj rimedoj pereigi la asocion, sed ĉiam kun malsukceso.

La organizo de la Asocio

Depost longa tempo K. F. (Kooperativa Asocio) estas centra organizo nur

Dum ĉiu aŭtuno la societoj kunvenas distrikte laŭ sama principo, kiu validas ĉe la kongreso. La distriktaj kunvenoj estas ia dividita kongreso, tamen kun aliaj taskoj ol ĝi. La distriktkunvenoj pritraktas la ekonomian staton de la societoj en la distrikto. Oni tamen en la distriktkunvenoj ne povas fari decidojn rilatantaj la kongreson. La kunvena tasko estas ankaŭ elekti distriktestraron, kiu prizorgas la propagandon kaj helpas al la fondo de novaj societoj. Ili ankaŭ elektas reprezentantojn en la administran konsilantaron de la asocio. Tiu konsilantaro kutimas kunveni po 6—8 fojoj jare kaj konsistas prefere el vendejestroj. Pro tio oni havas grandan sperton pri la komercaj kaj organizaj problemoj, kiujn havas la lokaj societoj. Tamen oni ankaŭ laŭ la statutoj devas elekti laikojn en la konsilantaron. Memkompreneble neniu el la estraranoj povas esti membro de la konsilantaro, kies ĉefa tasko estas elekti la gvidantojn de la asocio (la estraranojn) kaj kontroli ĝian administradon.

La estraro de la asocio konsistas tute el salajrataj ĉefoj, ĉiu respondeca pri sia agado. Kvar el ili estas ĉefoj por la industriaj entreprenoj kaj varsekcioj. Alia estrarano prizorgas la kas- kaj la librotenadan agon kaj ankaŭ la revizion. Unu prizorgas la organizan fakon, kies tasko estas la klerigo kaj la eduka laboro en ĉiuj siaj formoj. La estraro konsistas el sep personoj. La sepa estrarano reprezentas la aliĝintajn al la asocio asekurajn societojn.

La negoca sekcio de K. F.

Kiel supre dirite, K. F. komencis kiel agenta entrepreno. La fortoj tamen kreskis, kaj oni transiris al starigo de propraj provizejoj. K. F. estiĝis mem pogranda komercisto, kiu aĉetis kaj vendis por maklera pago. Nuntempe tia agado ne plu ekzistas. Kiam komenciĝis la aĉetada kaj la vendada agado, stariĝis gravaj problemoj. Montriĝis necese aranĝi provizejojn en diversaj lokoj de la lando por povi sufiĉe rapide servi al la lokaj societoj. Depost 1918 la nuna organizo ekzistas, kiu montris sin plej oportuna.

Laŭ tiu organizo ĉia aĉetado okazas per branĉe aranĝitaj varsekcioj en Stokholmo; sed la vendado okazas per 11 vendkontoroj en diversaj lokoj de Svedio. La celado al koncentrigo de l' aĉetoj volas estigi specialigon kaj detalan scipovon pri tia aĉetado. La sistemo ankaŭ donas eblon al la sveda kooperativo laŭ bezono povi direkti sian aĉet-demandon al unu direkto, kaj tiele kaŭzi malaltajn prezojn. Ĉiu ĉefo de vendkontoroj obeas al la koncerna estrarano. Sed li tamen memstare agas. Li aĉetas kaj vendas laŭ propra respondeco ktp. Plej granda el la diversaj varsekcioj estas la manĝaĵa sekcio (faruno, margarino, grioj), kiu en la jaro 1927 havis enspezon da 53,9 milionoj da kronoj. La aliaj sekcioj nune estas: fabrikaĵoj (sukero, sapo, kon-

---

Sed se la organizo havas kiel unuan celon fizike evoluigi la italan junularon kaj al ĝi samtempe doni la senton pri vera milita disciplino, ĝi ne limigas sian agadon je tiu flanko de edukado, sed celas male etendi ĝin pli kaj pli sur la kulturan kampon. Tial oni kreis specialan organizon, por faciligi al la junuloj trovi karieron kaj doni al ili profesian kaj teknikan preparadon. En la kamparo la organizo aranĝis kursojn teoriajn kaj praktikajn por agrikulturo; en la urboj ĝi direktas metilernejojn por mekanikistoj, radiistoj ktp. En kelkaj havenoj ekzistas ŝiplernejoj por disponigi estontajn maristojn. Krome oni kreis en multaj urboj "domojn de Balilla" kun bibliotekoj, kunvenejoj, kinoj ktp.

Per tiu organizo la faŝismo permesas al ĉiu junulo edukiĝi laŭ siaj inklinoj. Sed ĝi gardas bone sian ekskluzivan monopolon en ĉiuj institucioj kaj opinias, ke per tiu sistemo la junularo estos instigata al la necesaj virtoj por la grandeco de Italio. Ĝi ja celas antaŭ ĉio ekflamigi la n a c i a n s e n t o n. Nenio okazas en tiu kadro krom sub la signo de l' patrio. La partisekretario Turati instruas la junulojn tiele: Ĉe ĉiu ago vi devas demandi unue: "Ĉu tio estas utila al mia patrio? Kaj ĉiun vesperon, antaŭ ol ekdormi, vi devas demandi vin: Kion hodiaŭ mi faris por mia patrio?" Tiu eduksistemo kompreneble ignoras tute ĉiun senton de universala frateco kaj de homara solidareco. La ŝtata subsekretario por publika instruado kriis mem: "La Homaro ne gravas al ni, ĉar niaj koroj ne havas la sufiĉan kapablon por emociiĝi por la 4 miliardoj 800 milionoj da loĝantoj, kiuj vivas sur la tero . . ."

Tia estas la realisma filozofio de l' faŝismo, sur kiu konstruiĝis tiu fera, malvasta, ekskluziva sistemo, kiu subpremas ĉiun liberecan emon.

fitaĵoj ktp.), kolonivaroj (kafo, teo, fruktoj) ŝuoj, objektoj por la hejmo kaj labormaterialoj kaj maŝinoj. La diversaj vendkontoroj difinas centre la prezojn, kiujn K. F. postulas de la konsumsocietoj. Granda diferenco estas en tiu rilato inter la privatuloj kaj la kooperativo. Dum la privatuloj ĉefe sendas personojn kun specimenoj, la kooperativaj vendkontoroj plej ofte prizorgas la mendojn telefone. Se temas pri vendado de vendaĵoj, kiujn oni oportune ne povas fari telefone, la aĉetantoj de la konsumsocietoj kolektiĝas ĉe varfoirej, kiujn K. F. de tempo al tempo aranĝas. La skribado de la fakturoj okazas plej multe ĉe la vendkontoroj, sed la librotenado estas farata en Stokholmo, kie K. F. posedas deketaĝan domon, en kiu ĉiuj centroj ekzistas, ankaŭ la mona administrado.

John Johansson.

HODIAŬ EN BULGARIO

III

Ĝendarmoj

Ili estas la plej krudaj homoj, kiuj ofte ne povas legi nek skribi. Arestitojn ili traktas kiel sovaĝuloj. La estroj aspektas, kvazaŭ ili povus mortigi homojn pro iu eta preteksto. Ili montras, ke la potenco estas en iliaj manoj, ke ĉiu devas al ili obei. Malfeliĉa estas homo, kiu falas sub iliajn ungojn. Oni diris al ni, ke ili estas malhonestuloj, kaj, por kondamnigi homon al morto aŭ dumviva malliberigo, ili metas "atestaĵon" en la poŝojn de arestitoj. Nia vizito al Lom, Norda Bulgario, panikigis la lokan ĝendarmestron, kvazaŭ la sorto de Bulgario dependus de nia alveno. Li arestis dufoje unu el la lokaj esperantistoj kaj interplekte demandis lin pri ni. Tiu estis nur dumonata esperantisto kaj nenion sciis pri ni, krom tio ke ni estas esperantistoj kaj ke morgaŭ ni intencas fari paroladon pri esperanto ĉe la jarfesto de Turista Asocio. Por tion malebligi, la ĝendarmestro vokis nin, ke ni tuj aperu antaŭ li. Li asertis al ni, ke ni estas komunistoj, ĉar ĉiu loka esperantisto estas komunisto, ke esperanto estas komunismo, kaj ordonis, ke post tri horoj ni forlasu la urbon. Neniu klarigo niaparte taŭgis. Estro de ĝendarmoj eĉ asertis, ke niaj bulgaraj kartoj de identeco estas falsaj, kvankam ni vivis per ili dum ok monatoj ĉie en Bulgario. "Iu polica oficisto povus doni al vi tiujn kartojn; nek per ili nek per via nacia pasporto vi rajtas esti en Bulgario", li diris. Nenio helpis, ni estis kondamnitaj. La estro perdis sian kapon. Li aspektis, kvazaŭ li povus tuj doni ordonon, torturi, ekzekuti homon. Estas li, kiu decidas, al kiu partio aŭ religio aŭ sekso vi apartenas, aŭ kiu vi estas. Ĉio pruvas, ke li terure timas komunistojn kaj inkubas ilin ĉie, kie ili ne estas. Terura devas esti vivo de loĝantaro en similaj malsanaj manoj.

Vagado tra meza Bulgario estis senĝena; sed, kiam oni alproksimiĝas al Sofio, komenciĝas inspektado de viaj dokumentoj. Ve al vi, se ili ne estas en ordo, aŭ vi hazarde ne kunprenis ilin. Subite eksaltas el arbaro sur solecan ŝoseon al vi ĉifone vestitaj homoj kun pafiloj kaj postulas karton de identeco. Nenia signo, ke ili estas ŝtataj oficistoj, krom la pafilo. Ili estas la dungitaj ciganoj, malsatuloj, kiuj por unu manĝo mortpafas iun. Kaj ili havas plenan leĝecon mortigi iun, kiu ne povas pruvi sian identecon. Ilin oni uzas kiel oficialajn mortigistojn. Alian fojon ni renkontis ekster vilaĝo, tuj post kurbiĝo de vojo, ĝendarmon kun ĉifone vestita cigano. La lasta direktis la pafilon sur nin, por haltigi nin. Dum kontrolo de dokumentoj ni demandis la ĝendarmon ĉu li pafas homojn. "Ne mi, sed li", respondis la ĝendarmo. Tiel oficiale neniu ĝendarmo mortpafas.

En Pirdop oni solene akceptis nin. Civitanoj povis vidi ordinarajn turistojn, kun dorsosakoj, enirantaj sur la placon de la urbo. Subite gvardio el altaj, fortikaj viroj en bela uniformo, eble la gvardio de l' reĝo, ĉirkaŭis nin kaj spalire eskortis nin en la korton de la palaco, — ĝendarmejo. Tiuj granduloj parolis al ni iujn ĝentilaĵojn, kiuj al nia nealkutimiĝinta orelo sonis iomete krude. Kaj bedaŭrinde ni ne povis kompreni ilian enhavon. Tiu, kiu kontrolis niajn dokumentojn, havis speciale sovaĝan mienon, ŝajne por montri al ni, ke li estas la estro. Ni estus scivolaj, kian mienon li farus, se ni estus lasintaj hejme niajn dokumentojn, aŭ se niaj fotoj sur la dokumentoj ne plaĉus al li.

Vaguloj.

(Daŭrigota.)



En la batalo pro la mondmerkato

La teksaĵ-industrio estas unu el la ĉefaj industrioj en Britio, kaj ĝia prospero aŭ malprospero nepre influas al la tuta enlanda industriaro. Ĝia nuna pozicio indikas la ĝeneralan nivelon de la ekonomio en tiu ĉi lando. Napoleono siatempe nomis Brition "la fabriko por la mondo". Kaj eĉ antaŭ 1850 oni jam konstruis ferajn monstrojn, i. a. ferŝipojn, fer-vojojn ktp. En la unua duono de la lasta jarcento la britaj fabrikistoj povis dissendi siajn teksvarojn ĉien. Sed en la dua duono, kiam la ferkapitalistoj dissendis la maŝinojn, per kiuj oni produktas tiujn varojn, tiam estis eble por alilandaj fabrikistoj, mem produkti varojn kaj ne importi ilin el Britio. Unu lando post la alia por si mem produktis per britaj maŝinoj: tiel Britio perdis unu aĉetanton post la alia. Eĉ plie, tiuj landoj troproduktadis kaj eksportis konkurence kontraŭ Britio. Tiel kreskis la nombro da fabrikistoj, sed malkreskis en sama proporcio la merkato, ĉar la mondsurfaco estas ja limigita. Jus antaŭ la lasta milito oni aŭdis pri projektoj por konstrui fervojon de Berlino al Bagdado tra Centra kaj Sudorienta Eŭropo kaj de Kapo al Kajro tra tuta Afriko. Post la milito oni projektis subteran tunelon de Kale' (france: Calais) al Dovero, tiel interligante Brition kun Francio. La produktkapablo kreskis, kaj kun tio la konkurenco plikakriĝis. Tio funde klarigas la veran kaŭzon — la ekonomian kaŭzon — de l' lasta mondmilito.

Per malmultaj ciferoj tiu disvolvo estas kontrolebla: $^1/_3$ de la brita komerco estas eksporta. Ĉar tiu eksportkvoto jam falis je $^1/_3$, tial almenaŭ 10% de la laboristaro estas senlaboraj (el 20 milionoj almenaŭ 2 milionoj). La teksistoj laboras nur 3 tagojn semajne, kaj la karbministoj same. Tiel oni senerare povas kalkuli 20% de la laboristaro kiel senlaborajn.

Eksporto de koton-ŝtofo el Britio falis je 40% kompare kun la jaro 1913. (1913 estis eksportataj por proks. 6700 milionoj da metroj da ŝtofo, 1926: por proks. 3850 mil. da metroj.) La ĉefa merkato estis la malproksima Oriento, t. e. Hindio kaj Ĉinio, al kiuj la eksporto plej multe falis. Eksporto de koton-ŝtofo al Hindio sumiĝis en 1913 je proks. 2850 mil. da metroj da ŝtofo,

Neniu SAT-ano, neniu laborista esperantisto povas malhavi la novan broŝuron de K-do **E. Lanti**

La Laborista Esperantismo

40 paĝoj

Prezo: 0.40 mk. g.

—o—

Mendu senprokraste ĉe **Administranto de SAT,** Colmstr. 1, **Leipzig 0 27.** — Francianoj mendu ĉe la sidejo de SAT, 23 rue Boyer, **Paris XX.**

en 1925 je proks. 1300 mil. da metroj; al Ĉinio en 1913 je proks. 700 mil. da metroj, en 1925 je proks. 150 mil. da metroj. Tiu eksport-falo al Hindio okazis nur, ĉar nun Hindio per la britaj teksmaŝinoj kapablas produkti tiom, kiom ĝi antaŭe importis. En jaro 1900 Hindio produktis ĉ. 950 mil. da metroj, sed en 1926 pli ol 1900 mil. da metroj. Tiu pliproduktado kune kun la falo en la konsumo preskaŭ egalas la falon en la briteksporto al Hindio. En 1910 Hindio ankoraŭ eksportis kotonfadenon al Ĉinio. Sed la teksindustrio en Ĉinio mem tiom kreskis, ke hodiaŭ la importo de Hindio al Ĉinio estas preskaŭ nula. Ankaŭ Japanio partoprenas en tiu eksportado: en 1913 ĝia parto estis nur 1% de la tuta hindia importo je kotonvaroj; en 1925 estis 13%. En 1913 Japanio eksportis Ĉinion 23% de la tuta ĉinia importkvanto je kotonaĵoj; en 1925 estis 58%. En jaro 1900 Hindio havis 4 945 183 ŝpinilojn; en 1924 ĝi havis 8 510 633 ŝpinilojn. Dum la jaroj 1910/13 Japanio eksportis meze 125 milionojn da metroj da kotonŝtofo, sed en 1926 proks. 1300 milionojn da metroj. La hindia registaro forprenis la antaŭan imposton de la importita maŝinaro, forprenis la imposton de la eksportata kotono (3½%), sed altigis la imposton sur import-kotono de 7% al 11% kaj donis grandan subvencion al la fer- kaj ŝtalindustrio. Pro tiu ekonomia evoluo ĝi estas reprezentata per delegito ĉe la Ligo de Nacioj.

De 1904—1913 Britio eksportis 1 589 955 mil-kilogramojn da teksmaŝinoj: de 1914—1927 ĝi elsendis 1 347 842 mil-kilogr. Kion povas fari la ricevintoj per ili? Ĉu ilin ĵeti en la maron? Kompreneble la alilandaj kapitalistoj volas ilin eluzi, kaj tiel Britio ne nur perdas sian antaŭan merkaton por siaj kotonvaroj, sed eĉ pli ĉagrene: tiuj landoj siavice konkurencas kaj enkondukas en aliaj landoj kontraŭ Britio.

Mi finas tiun ĉi artikolon per kelkaj ciferoj pri kresko de ŝpiniloj en ĉiu lando. Interese estas konstati la kreskon en Hindio, Japanio kaj Ĉinio: Japanio havas 1928 jam 5,3 milionojn da ŝpiniloj (1912: 2,1 mil.), Ĉinio 3,4 mil. (1912: 0,9 mil.), Hindio 8,5 mil. (1900: 4,9 mil.); Britio 60,3 mil, Usono 37,6, Sovetio 10,8, Germanio 10,3, Francio 9,6, Italio 5, Ĉeĥoslovakio 3,5, Belgio kaj Brazilio po 2,1, Hispanio 1,9, Kanado 1,7, Polio kaj Svisio po 1,5, Aŭstrio 1 milionon, la ceteraj ŝtatoj malpli grandajn kvantojn.

J. Flower, Londono.

Rimarkigo. En n-o 205 aperis artikolo pri la Sonneberg-a ludilindustrio. K-do 11 983 konfesas, ke li ne klare esprimis sian opinion, kaj tial okazis miskompreno. Li skribas, ke li ne malrekomendas al la hejmlaboristoj principe la batalon por pli bonaj prezoj, sed dezirus, ke ili rezignu je batalo sub la nuna estraro, ĉar ĉiam la estroj de sindikatoj akirigas la laboristojn plialtigon de la pohora salajro je nur unu aŭ du fenigoj, kaj la rezulto ne estas profitodona por ili, ĉar poste oni plialtigas la monhelpon por la sindikatoj. — Jen la pliprecizigo de lia vidpunkto, kiun ni liadezire publikigas. — Red.

Semajno el mia vivo

Mi estas 21-jara fraŭlo kaj loĝas kune kun miaj gepatroj, alligita pro la sorto de laboristo, kiu ne povas ĝui apartan loĝejon kaj por ĉiu infano, kiel la riĉulo, lui komfortan ĉambron. La destino min katenas al laboro. Jes, kun ĝojo mi plenumas mian devon. Kiam la unua semajna tago, lundo, vekas min, ĝi admonas min al ĉiutaga laborado. Je la 6-a mi ellitiĝas, vestas min kaj kaftrinkinte rapidas al laborejo. Antaŭ la laborkomenco mi legas laŭ dispono de tempo ankoraŭ mian laboristan gazeton, kiu ĉiam komunikas la novaĵojn pri diversaj ŝtatoj kaj tendencoj. Okupata kiel presisto, mi ankaŭ donu kelkajn informojn pri nia preseja laboro. Ni ne presigas la tagajn gazetojn, sed diversajn librojn, broŝurojn ktp. La laboro estas dividita por ĉiu aparte. Estas presistoj, kompostistoj kaj bindistoj. La kompostistoj havas la taskon, laŭ la postulita manuskripto komposti, dum la presistoj presas la kompostaĵon per maŝino sur paperon. Poste venas la vico de la bindisto. Pro abundeco da presistoj multaj el ili en Aŭstrio estas senlaboraj. Sed ŝajnas, ke pro okhora laboro ĉemaŝina, kiu jam estas enkondukita, la cirkonstancoj iĝos pli favoraj. La presistoj estas organizitaj, kaj dum senlaboreco ili ricevas de la organizo la saman subtenon, kiun pagas la ŝtato. Malpermesata en la laborejo estas fumado kaj manĝado. Tion oni devas fari aliloke. Lunde la tempo tre malrapide pasas, ĉar oni ĉiam me-

---

Ĉu ĉiam estis sklavo la virino?

(Fino)

Arturo Ŭajt (angle: Wright), misiisto, kiu dum multaj jaroj vivis ĉe la seneka-irokezoj[1], tiel priparolas ilin: "Kio koncernas iliajn familiojn, en tiu tempo, kiam ili ankoraŭ loĝis en siaj longaj domoj[2], ĉiam nur unu klano (gento) praktikis la antaŭecon, tiel ke la virinoj prenis siajn edzojn el aliaj klanoj ... Orde la virinoj regis en la domoj; la provizoj estis komunaj; sed ve al tiu malfeliĉa edzo aŭ amanto, kiu estis aŭ tro mallaborema aŭ tro mallerta por aldoni sian devigan parton al la provizoj. Oni ĉiuminute devis esti preta, ke oni estu elĵetata, sen atento pri tio, kiom da knaboj aŭ propraĵpartoj oni havas en la domo. Kontraŭstaron montri ne estis permesate; por li ne restis alia elekto, ol aŭ reiri en sian klanon, aŭ enedziĝi alian klanon. En la klanoj kaj aliloke ankaŭ la virinoj regis. Kelkfoje ili ankaŭ eksigis la estron kaj derangigis lin ĝis la vicoj de l' ordinaraj batalantoj." Vidu la cititan libron de Engels.

[1] Tribo ĉe la usonaj indianoj. [2] Komunista mastrumado de plimulto da familioj.

Fine ni citu ĉi tie artikolon, kiu aperis en hungara ĵurnalo P. N. 4. 9. 1927: "Kie la virino estas sinjoro ... El Moskvo oni skribas: Scienca ekspedicio trovis strangan popoltribon en la kaŭkaza Azerbejdĵan-teritorio, la tielnomata "Jasaj" - tribo ... Estas stranga ties vivmaniero. Tie ankoraŭ ĉiam la matriarkata sistemo regas[1]. Virino estas la tribestro kaj virino estas ankaŭ estro en la familio. Virinoj faras la plej gravajn laborojn de l' produkto kaj la viroj havas nur tute ordinarajn rolojn[2]."

Mi citis nur kelkajn ekzemplojn, sed mi esperas, ke tiuj sufiĉas por konvinki la Gek-dojn, ke estis tempo, kiam la virinoj ne estis sklavoj; eĉ ĉie en la triboj ili regis. Pri tio, kiel la virinoj perdis siajn bonegajn poziciojn pro manko de loko, mi hodiaŭ ne povas paroli. Ke la virino "ĉe la plimulto de l' hodiaŭaj primitivuloj estas konsiderata kiel ŝarĝobesto", tio tute ne estas vera. Kvankam ili faras preskaŭ ĉian laboron, ili estas tiel sanaj kaj bonkorpformaj kiel la viroj. Jonzen (angle: Johnson) parolas pri la Adombi-tribo loĝanta apud la Kongo-rivero, ke "tie la virinoj ĉe ŝarĝo-livero kaj ĉe aliaj pezaj laboroj faras fortan laboron; malgraŭ tio ili estas plene feliĉaj, ofte pli plenfortaj kaj pli bele evoluintaj ol la viroj; kelkaj el ili havas vere belegajn formojn."

[1] La tribo estas patrinrajta. [2] Pri tio aperis bone informa art. en "S-ulo" n-o 179 (8. 3. 28) sub titolo "Fraŭlina gento".

En la interno de Aŭstralio malofte okazas, ke la viroj batas la virinojn pro ĵaluzo; sed ne malofte tiel ŝanĝiĝas la afero, ke tiaokaze la viro ricevas ĝisfundan batadon de l' virino. — Se tiu ĉi labor-disdivido, ke la virinoj laboras, estus malutila por ili, la raso jam estus pereinta. Sed ni jam povis konstati supre, ke kelkloke eĉ tie, kie la virinoj regas, ili faras la laboron. Precipe sub la tropikaj klimatoj naskiĝus danĝero, se la virinoj ne laborus, kiu estus pli malutila al la raso, ol se ili laboras[1].

Koncerne la vestadon de l' virinoj nur tiom estu dirate, ke regas kruela konkuro en la aferoj de vesto. La fera

[1] Por tio ricevas kontentigan klarigon la leganto per la verko de Remi de Gurmon (france: Remy de Gourmont): La fiziko de la amo. La verko aperis franclingve, sed estas jam tradukita en kelkajn lingvojn.

moras la dimanĉajn horojn. Tagmeze mi iras hejmen por tagmanĝi. Loĝante en la malproksimo de mia laborejo, mi ofte devas, pro malmulteco da ripoza tempo, engluti mian manĝaĵon; alie mi malfruiĝus, ĉar mia tagmeza paŭzo estas nur unu horo.

Posttagmeze je la 17-a mi forlasas la laborejon kaj senprokraste iras hejmen. Tien alveninte, mi manĝas kaj tuj post alivestigo mi veturas per tramo al orient-stacidomo. Tie okazas en la konfidul-ĉambro la esperanta kurso, de la 18-a ĝis 21-a. Mi tre fervore lernas esperanton. Mardę mi pli malfrue matene ellitiĝas, vestas min kaj por ĝustatempe atingi la laborejon, ofte rapidas. La laboro estas la sama kiel pasinttage. Vespere mi hejme estas tre okupita per organizaj devoj, ĉar mi estas kasisto de nia sindikato, kaj tial pro amasiĝo de diversaj skriblaboroj de unu semajno mia okupo pretendas la tempon ĝis enlitiĝo. Merkrede, dum streĉa laborado, mi sopiras la 18-an horon, por viziti la esperantan kurson, ĉar post du horoj da peniga serioza leciono ni ĉiam ludas diversajn esperantajn humorajn ludojn, kiujn ni emus fari anstataŭ unu horon eble 4 aŭ 5 horojn. Ĵaŭde, post la sama unutona laborado, mi tuj post laborĉeso rapidas hejmen, min lavas kaj surmetas mian festvestaĵon kaj vizitas dancejon, kie mi pasigas mian solan plezuron. Krom esperanto kaj dancado mi ne ĝuas ion alian. Vendrede, instigite kaj dezirante ricevi mian salajron, mi plej diligente laboras en mia laborejo. Post finita labortempo mi prenas mian salajron kaj iras hejmen. Vespere mi nutras mian cerbon per legado de sciencaj kaj klerigaj verkoj. Plej ofte mi legas politikajn kaj socialistajn verkojn, interalie esperantajn broŝurojn; precipe mi preferas eldonaĵojn de SAT. Vendrede mi vizitas ankaŭ kelkfoje esperantajn kunvenojn. Tial mia plano por tiu tago ne estas firma. Sabate mi laboras nur ĝis tagmezo. Posttagmeze komenciĝas mia libera tempo kaj daŭras ĝis lundo matene. Post ŝanĝo de tolaĵo kaj vestaĵo mi legas "S-ulo"-n kaj lernas miajn hejmtaskojn, kiuj koncernas ofte tre interesajn temojn. Vespere mi vizitas aŭ teatron aŭ kinon kun miaj esperantaj kursgeamikoj. Ofte ni aŭskultas esperantajn paroladojn kaj, ĉar nun estas la tempo por kursfinoj, mi tre ofte ĉeestas ilin. Dimanĉe mi ekskursas, laŭ la cirkonstancoj, en arbaron ĉirkaŭanta Vienon (Wiener Wald). Tie mi pasigas feliĉajn horojn, ĉar pro mia juneco kaj vivrajto instigite, mi deziras okazojn, eluzi kaj apliki mian junecon por ĝui la meriton kiel decas por simpla laboristo. Vespere, kiam la suno ankoraŭ sendas la lastajn radiojn, mi marŝas, plej ofte sur la ŝoseoj aŭ avenuoj, al mia loĝejo. Sopire mi serĉas mian ripozejon por refortigi la korpon por la sekvanta tago, kiu ree min admonas al laboro.

Tiu ĉi artikolo estas verkita de la kurslernanto Franz Zeiner kiel hejmtasko 11. 2. 28.

---

leĝo regas: Kiu ne kuras, estas nepre forvenkata. Kontraŭ tio estas vana ĉia prediko, ĉar ĉiu virino volas vivi, kaj mi el persona sperto scias bone, ke la vivo por ili estas infero, se ili ne povas sin vesti bele. Mi konas knabinojn-kudristinojn, kiuj malsatadis por ke ili povu aĉeti novan ĉapelon kaj ŝtrumpojn; alian, kiu laboras en tabakfabriko ĝis la 16-a horo kaj poste kudras hejme ĝis la 23-a—24-a por havi belan vestaĵon.

Sed malbone juĝas tiu, kiu tial kondamnas ilin. Ne sufiĉas rigardi sole la eksterajn aperojn de iu kaj jam pretigi juĝon, ĉar la akcesorajn cirkonstancojn oni ankaŭ devas konsideri kaj nur poste juĝi. Kion ni mem faras kontraŭ ĉi tiu situacio krom kritiki? Kiu inter ni klopodas okaze de kunvenoj aŭ en fakorganoj, por paroli al la virinoj kaj provi konvinki ilin pri la malutilo, kiun kaŭzas kelkaj vestoj al ili? Kiu penadas, ke virinoj aliĝu al diversaj sportfakoj de laboristaj organizoj? Kiu donas garantion, ke poste la K-doj ne rigardas la ilon kiel celon kaj anstataŭ klerigi amindumas? Tio estas malfacila tasko, kontraŭ kiu ni jam multe pekis, ne okupiĝante pri ĝi. Koncerne la religiecon de l' virinoj ni ne miru — ĉar nenie ni estis, dume la pastroj ĉiutage staris en la predikejoj. Ekzistas regionoj, kie malgraŭ ekzisto de laboristaj organizoj nenio okazas por ekvilibri la laboraĉon de l' pastraro.

Koncize iom pri la situacio en Hungario. En ĉiuj provincaj urboj la metiistaj knabinoj estas rangigataj en la t. n. "Madona kongregacio"-j, kaj el tie la proletoj prenas siajn edzinojn. Oni ne bezonas rakonti, kiel tiuj knabinoj estas edukitaj por bridi la ateistan proleton kaj eduki la geknabojn laŭ la plaĉo de dio[1].

Ĉi tie vana estas ĉiu prediko sen laboro. Ni nur fidu en nia propra forto. Fortigu ni niajn organizojn, kaj kiam la Proletaro estos sufiĉe forta por preni la potencon, la virino tuj estos edukebla kaj libera. Fero.

[1] Ne havinte alian rimedon, mi kaj je mia instigo kelkaj K-doj pli junaj aligis kelkajn knabinojn al la "Naturamikoj". La instrukciojn mi disdonis inter la K-doj. Sed je mia plej granda ĉagreno mi spertis, ke parte ili amindumas, parte ne prenis serioza sian taskon. Rezulton nur mia laboro donis, kaj dum mallonga tempo el la supre menciita kongregacio kelkaj knabinoj eksiĝis je la ĉagreno de l' pastra estro.

★ DIVERSAĴOJ ★

La "Ford" de l' ŝufabrikado

Li estas ĉeĥo nomata Tomas Bata, filo de ŝuflikisto, kiu mem faris sian karieron. Post vojaĝoj en Eŭropo kaj Usono, li imagis apliki en sia lando la amerikajn metodojn de seria fabrikado. Li jam dungis 5000 laboristojn fine de la milito. Bone trapasinte la monkrizon, li okupas nuntempe 12 000 personojn kaj produktas 75 000 parojn da ŝuoj tage. Li vendas ilin pli malkare ol ĉiuj liaj konkurantoj. Li antaŭkalkulas povi liveri en 1935 paron da bonaj ŝuoj por 2,50 mk. g. (15 fr. frk.) La germanaj ŝufabrikantoj komprenėble akre kontraŭbatalas lin, ĉar ili jam suferis gravajn perdojn. La importo de Germanio el Ĉeĥoslovakio leviĝis de 329 000 paroj da ŝuoj en 1925 je pli ol 2 milionoj da paroj dum unua duonjaro 1928. La salajroj ĉe li laŭdire estas same altaj kiel tiuj de la germanaj laboristoj. Bata estas absoluta kontraŭulo de l'socialista doktrino. Li ne nur aplikas la "sciencan metodon" de l' sistemo "Ford", sed krome "socian metodon", kiu donas al la laboristo spiriton de kapitalisto, senton de respondeco, per 250 subdividoj en la fabriko, ĉiu fako kun larĝa aŭtonomio.

Tatuo de la lernejinfanoj en Italio

Kiel el Revigo estas raportata, invitis la tieaj lernejestroj la infanojn en Revigo kaj aliaj lokoj por postuli, ke ili tatuu la faŝistan insignon, la liktorfaskon, sur la brusto aŭ brako. Estas konate, ke la popollernejaj infanoj jam delonge estas devigataj porti kiel lernejvestaĵojn nigrajn ĉemizojn kaj je la komenco kaj fino de la instruo preĝi al dio por peti ŝirmon por la "Duce". La tatuo estu trikolora. La loĝantoj en la koncernaj lokoj, kiuj troviĝas en la provinco Venezio, estas ege ekscititaj kaj en Revigo okazis protestmanifestacio. Ankaŭ en la urbeto Cavazzana okazis manifestacio, dum kiu la laboristo Giuseppe Piola estis arestata. Piola estas kondamnita je tri jaroj da ekzilo. (INO.)

Gepatroj! Geinstruistoj! Edukistoj!

La septembra kajero de

Sennacieca Revuo

enhavas valoran pedagogian materialon, pri kaj por la infano. I. a. ankaŭ la opinion de pedagogo pri la "mirakla" instrumetodo de *A. Ĉe.*

Ĉiu instruiĝema K-do havigos al si tiun kajeron same kiel ĉiu fakulo k infanamiko

Mendu ĉe

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Prezo: 0,35 gmk.

TRA ESPERANTIO

Al ĉiuj membroj!

Nia publika demando rilate la jaran kotizon al SAT havigis al ni multajn, kaj plej diversajn respondojn. Fakto restas, ke ĉiu respondinto konstatis, ke nia kotizo estas tro malalta kaj, sekve nepre altigenda. Nur du K-doj, kvankam ili ankaŭ konfesis la malaltecon de la kotizo, tamen ne deziris plialtigon pro ekonomiaj kaŭzoj kaj eĉ deziris maldikan jarlibron. Kelkaj deziris, ke ni eldonu la Jarlibron ĉiu-dujare. Aliaj, tre multaj deziris plialtigon de la kotizo ĝis 100%.

Intertempe okazis la Kongreso. Post larĝa diskutado estas decidite: la jara kotizo al SAT estu plialtigata je 1/3 (la landojn kun eksterordinare malbona ekonomi-stato, laŭeble indulgi); en la Jarlibro ne plu estu presataj la adresoj de ĉiuj membroj, sed nur la adresoj de la perantoj kaj vicperantoj. En lokoj kie estas nur unu membro, ni citu tiun adreson kaj en lokoj, kie estas pluraj SAT-anoj, sen difinita peranto, ni nur citu la adreson de la plej malnova SAT-ano. Nun nepre necesas, ke la SAT-anoj en siaj koncernaj lokoj kunvenu kaj elektu siajn

Peranton kaj vicperanton.

Al tiuj oficoj elektiĝu nur la plej fidindaj kaj akurataj K-doj aŭ K-dinoj. Post elekto sciigu senprokraste la rezulton al la Adm. de SAT.

Al ĉiuj ceteraj membroj, kiuj ial deziras la publikigon de siaj adresoj en la Jarlibro, tion ni faros kontraŭ pago, kiun ni fiksas por ĉiu simpla adreso (2 linia), publikigota en la Jarlibro je 0,50 mk. g. kaj por ĉiu plia linio same je 0,50 mk. g. Niaopinie tio estas la plej bona solvo de la tikla kotiz-afero.

Certe per ĉi tiu aranĝo la valoro de nia Jarlibro ne malpliiĝos, ĉar per tiu foresto de la seka adresaro (multaj adresoj ripetiĝis jam kelkfoje en la Jarlibro) ni havos lokon liberan en la Jarlibro por pli valoraj publikigoj. Plue oni devas konsideri, ke nia membraro daŭre kreskas kaj per tio la Jarlibro fariĝus tiom dika, ke neniu K-do povus ĝin enpoŝigi. Pri la aperdato de la sekvonta Jarlibro ni ne jam findecidis. Tiurilate ni sendube ankaŭ trovos bonan solvon.

Dume ni publikigas la novajn kotizojn al SAT por la jaro 1929. — La unuaj nombroj, kiuj tuj sekvas la landnomon, indikas la ordinaran jarkotizon (sen abono) por membro aktiva kaj membro pasiva, — la nombroj inter krampoj indikas la kroman kotizon de novaliĝantoj. Membroj, kiuj renovigas la membrecon ne bezonas pagi tiun kroman sumeton. Organizoj, grupoj, societoj ktp. pagu minimume la duoblon de la jara kotizo por membroj.

Argentino 1,50 (0,40) pes.; Aŭstrio 3 (0,50) ŝil.; Belgio 2,50 (0,50) belg.; Brazilio 4 (1) milr.; Britio 2½ (½) ŝil.; Bulgario 50 (10) lev.; Ĉehoslovakio 12 (3) kr.; Danio 2 (0,50) kr.; Estonio 1,50 (0,25) kr.; Finnlando 15 (4) mk.; Francio 10 (2,50) fr.; Germanio 2 (0,50) mk.; Hispanio 3 (0,70) peset.; Hungario 2 (0,50) peng.; Italio 10 (2,50) lir.; Japanio 1,50 (0,40) jen.; Jugoslavio 25 (6) din.; Latvio 2 (0,50) lat.; Litovio 4 (1) lid.; Nederlando 1,25 (0,30) guld.; Norvegio 2,50 (0,50) kr.; Polio 3 (0,80) zlot.; Portugalio 8 (2) esk.; Rumanio 50 (15) lej.; Sovetio 1 (0,25) rubl.; Svedio 2,50 (0,50) kr.; Svisio 2,50 (0,60) fr.; Turkio 1 (0,25) lir.; Usono 1 (0,25) dol. — En familio, kie estas kelkaj SAT-anoj, nur unu pagas la plenan kotizon, la aliaj nur la duonan, tamen nur tiu ricevas la Jarlibron, kiu plene pagis sian kotizon.

La Administranto de SAT.

INTER NI

— Mi estis unu el la unuaj SAT-anoj, sed nunjare mi decidis ne realiĝi. La nombro de anoj tro grandiĝis lastatempe . . .

— !! ?? . . .

— Vi miras. Nu, aŭskultu: mi loĝas en urbo, kiun trapasas multe da migruloj, laborserĉantoj kaj plej diversspecaj vaguloj. Lastan jaron mia hejmo fariĝis vera tranoktejo por SAT-anoj. Mia edzino, kiu komencis lerni esperanton, nun kondutas tute malamike al SAT kaj eĉ al nia lingvo. Intima vivo preskaŭ forestis inter ni. Ja ne pasis unu semajno, dum kiu ni ne havis la viziton de unu, du eĉ tri SAT-anoj. Mi konsideris kiel devon ilin gastigi, kaj por tio elspezis dum la jaro pli ol 150 svisajn frankojn. Fakte tia stato ne plu estis tolerebla, kaj mi decidis tute forlasi la esperantan movadon. Nur se mi loĝus ene de la polusa cirklo, mi ankoraŭ konsentus, ke mia nomo aperu en iu jarlibro . . .

Cetere, ne ĉiuj de mi gastigitaj "K-doj" estis bonedukitaj personoj. Kelkaj estis postulemaj, trudemaj. Mi eĉ suspektas, ke inter la vaguloj troviĝas parazitoj, kiuj serĉas laboron kun sekreta deziro ne trovi. Iu eĉ cinike konfesis, ke per tia vagado li almenaŭ evitas la kapitalistan ekspluatadon. Estas vere, sed mi ankaŭ ne plu volas, ke oni ekspluatu mian gastemon . . .

— Tiel kun akra tono parolis nia eksiĝinto. Mi provis rebati, ke li mem estas kulpa en tia afero. Nenio en la Statuto de nia Asocio ja devigas anon gastigi alian. Kiu faras tion, tiu agas laŭ sia memdecido. Estas tute memkompreneble, ke nia Asocio ne celas konkurenci hotelojn aŭ gastejojn. Kiu aliĝas al SAT kun la nura celo, ke per tio li povos senkoste travojaĝi la mondon, tiu estas simpla parazito kaj ne inda SAT-ano.

Sed la senpripensaj bonkoruloj, kiuj gastigas ĉiun ajn nur pro tio, ke li havas membro-karton de SAT en la poŝo, tiuj ankaŭ kulpas en tio, ke ili ebligas malvolviĝon de parazitemo en niaj vicoj. Kiu faras pli ol postulas nia Statuto, tiu ne rajtas riproĉi al la Asocio pro malagrablaj spertoj.

La racio ne la sentimento ĉiurilate regu la agojn de la SAT-anoj . . . E. L.

MALKARESO

En n-o 206 K-do Muri (102) opiniis sin kompetenta fari spritan kritikon pri kelkaj el niaj aktivaj K-doj. Certe bonvolemaj karikaturoj estas ŝatataj de ĉiuj, sed ne tiuj en kiuj oni aliigante la faktojn personece pikas tendencojn kaj K-dojn eĉ nekonatajn.

Kvankam dum la Kongreso sufiĉe silentema kaj nekonata, la "karesanto" malfermas la buŝon post la Kongreso por

1. Ofendi niajn ruĝfrontanajn K-dojn per menciaĉo pri "politik-eklezia ceremonioj de pugnomontrantoj". Ne estante ruĝfrontbatalanto mi tamen ne komprenas kiel la fiesprimo povos servi al intertendenca paco en SAT.

2. Citi proponojn, kies enhavon li aliigis je ridindaj sensencaĵoj. Ekz. neniu parolis pri "redakcia komisiono en ĉiuj terpartoj", sed temis pri kreo de redakcia komisiono en unu urbo ekster la urbo de la redaktejo; kaj tion proponis 6 K-doj. Similan taskon la Kongreso ja ankaŭ transdonis al Kontrol-Komitato. Pri "eterna manifesto" de SAT kvazaŭ proponita mi nur sciiĝis el la "artikolo". Mi nur aŭdis studan diskutadon pri SAT-programo.

Vere amuza estas la fabela projekto por "forigo de la malnova dio"; certe la tuta liberpensula fakkunsido stulte dormis, dum la "karesanto" deĵoris apud dia trono.

3. K-do Lanti tute ne estis "insultata" aŭ eĉ "mortbatata" de ĉiuj flankoj. Diversaj K-doj nur kritikis la spiriton de kelkaj gvidartikoloj en "S-ulo"; la sekvinta interdiskutado alportis la deziritan klarecon . . .

Partopreninto.

KOMUNIKO

Laŭ Kongresa decido ni komunikas, ke la 8-a Kongreso en Göteborg akceptis la sekvantan proponon, faritan al ĝi de K-do E. Drezen (Moskvo):

"La Kongreso insistu antaŭ la Lingva Komitato pri forigo el ĝiaj vicoj de la morale sin kompromitinta s-ro Krestanoff. Pri tiu decido estu presota informo en 'S-ulo'."

—«»—

Grava atentigo al la Vortar-helpantoj

Ĉe la lego de ĉi tiuj linioj sendu senprokraste viajn rimarkojn, proponojn pri difinoj, sugestojn ktp., kiuj rilatas al la parto ĝis la litero Ĵ.

Post kelkaj tagoj la unuaj manuskriptoj estos liverataj al la kompostistoj.

Ni jam ricevis abundan materialon el multaj landoj. Dankon al ĉiuj bonvolemaj kunhelpantoj!

Nia Kolektivo aktive laboras.

DIREKCIO DE SAT.

——«o»——

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

BRITIO. Ĝis mezo de sept. 182 lern. partopr. en korespondkurso de "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo). Multaj novaj kursoj komenciĝas. — **GERMANIO. Leipzig,** sekcio okcidento. Ni aranĝis ĉi somere 9 ekskurs. por renkontiĝi kun Gek-doj de proks. grupoj en banejoj. Survoje aŭ en vagonaro ni parolis k kantis esp-e. Per tio ni kaŭzis multajn diskutojn pri esp-o. En pasintaj semajnoj vizitis nin bicikle angla, jugosl. k hungara K-doj. Ili bone estis akceptataj. Niaj Gek-doj, plejparte SAT-anoj, estas ankoraŭ junaj. Ili estas aktivuloj k libervole gvidas kursojn. La pli aĝaj estas la konsilanta parto. Vojaĝantaj K-doj vizitu nin marde inter 20-a k 23-a h. en kunvenejo "Wilhelmshöhe", Leipzig-Plagwitz, Zschochersche Str., Ecke Naumburger Str. 84.

——«o»——

ĈE LA NEŬTRALULOJ

Sub titolo "Honoro por nia Prezidanto" sciigas "The Britsh Esperantist" pri la fakto, ke dum la Antverpena Kongr. s-ro Privat perdis la oficon de Prezidanto de Centra Komitato de la Esperanta Movado. Nun estas s-ro Merchant, kiu okupas tiun honorlokon, kaj la brita esp. gazeto skribas — karakterize! —: "...Sendube ĉiu membro de BEA... sentos iom da fiero, ke portempe la mano de brito estas ĉe la direktilo de nia ŝipo..."

*

La konferenco de la estraroj de l' geinstruistaj asocioj de baltaj ŝtatoj, kiu okazis en Kaunas 21. 8., rekomendis la uzadon de esp-o je instigo de la estonia delegitaro. En Estonio la movado nun tre vigliĝis, precipe en geinstruistaj rondoj. S-ro Ĉe faris sukcesan kurson por geinstruistoj en Tartu (Dorpat), same publikan kurson. Poste la Tartu-a Popola Universitato decidis enkonduki en sian lernplanon esp-on, aranĝante unu elementan kaj unu daŭrigan kursojn.

——«o»——

NEKROLOGO

Per tiuj ĉi linioj la est. gekorespondantoj akceptu la lastajn salutojn de mia kara frato

ROBERT BURKERT

SAT-ano 7813. Li mortis 23. aŭg. en sia 25-a vivjaro je la prolet-malsano (pulma tuberkulozo). Li estis fervora batalanto por la prol. liberiĝo. Lia i o m a ĝojo, kiun la malsano permesis, estis foto-sporto k korespondado. W. Burkert (3890).



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La Humanitaristaj Principoj kaj La Internacio de la Intelektuloj, de Eugen Relgis. El rumana lingvo trad. S. Prager. 48 pĝ. Form. 13½×21. Eld. Belga Esp. Instituto, 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno (Belgio). Prezo nemontrita.

Jen humanitarismo, nova kreajo. Mankis tiu vorto en esperanto. Ni danku! Jen nova idealo. Se idealoj mankas al vi, K-doj, ne timu. Fabriku iun vorton "Menŝanitarismo" (de germana vorto Menŝ: homo), aŭ "Ĉuoviekanitarismo" (de pola vorto Ĉuoviek: homo), kaj sur tero ne plu mankos idealo. Mi eĉ aŭdis en Parizo, en konferencejo, viron kiu, unuavide, tute ne ŝajnis freneza, kreinta tamen novan religion: "Divinisme", t. e. diecismo, ĉar "Théisme" aŭ "Déisme", t. e. diismo, ne sufiĉis por li. Eble li ne tute kuraĝis eltrovi "Divinitarismon". Oni aŭskultis lin kvazaŭ simpatie, sed subite li anoncis, ke tiun "diecismon" regus ekleziularo. Tiam, senrimede li ekfalis sub parizana ridego.

"Humanitarismo" ne posedas ekleziularon, aŭ, pli bone, Humanitaris*mon* ne posedas ekleziul*aro*. Ĉiu el vi estas jam "humanitaristo", senkotize, eĉ senkonscie, se li ja ŝatas tutan homaron, simple, kore, sindoneme, silente. Do, tiu "ismo" ne povas malplaĉi al ni, krom la vorto. Ĝi celas konstrui la saman venontan socion, kiel ni, sociigi la produktrimedojn, kiel ni. Sed Eugen Relgis volas labori sen iloj. Laboristaj movadoj timigas lin. Ankaŭ SAT, al kiu li dediĉas kelkajn liniojn, avertante ĝin timplene kontraŭ "vasaliĝo" sub politika partio (!) kaj memorigante pri la "neŭtrala religio", la "humanitarista koncepto" de Zamenhof!

J i e f.

La Flandra Movado, klarigata al la partoprenantoj de la XX-a Univ. Esp. Kongreso en Antwerpen. Eld. Flandrema Grupo Esp-ista, aliĝinta al la Flandra Fronto (Partio de Flandraj Nacionalistoj). 12 pĝ. Form. 13×18 cm. Prezo nemontrita.

La broŝuro servas por propagando de naciista movado kun ĉiuj laŭdoj k fieroj, kiujn kapablas genta patriotismo. La Antverp. kongr. esp-ista estis bonvena por tio. Ni citu unu frazon (pĝ. 10): "...ĉiuj flandraj nacionalistoj... samopinias, ke Flandrujo devas disponi pri siaj propraj aferoj k difini tute sendepende, kiuj estas tiuj aferoj." B.

La Blankaj Fratoj, n-o 3 de Bibliot. Nova Kulturo, eldonata en Burgas (Bulgario). 24 pĝ. Form. 12×19 cm. Pr. 0,40 sv. fk.

Tiu volumeto (verkita de St. Vatralski) estas daŭrigo de la komencita propagandserio por religia sekto gvidata de P. Dânov.

DU PETOJ

UNUA. Ĉu en la mondo tute forestas esperantistoj-maristoj. Mi pensas ke jes. Kial? Dum la ŝipirado 1928 nian havenon vizitis ĉ. 100 eksterl. vaporŝipoj sed ne unu esp-iston mi sukcesis vidi. Tre bedaŭrinda afero por nia norda esp. movado, ĉar inter multaj malkreduloj restas la opinio, ke esp-istoj maristoj en eksterl. ne ekzistas. SAT-anoj, venonttempe vizitonte nian havenon, ne forgesu plenumi sian devon interrilatiĝi kun Arhangelskaj SAT-K-doj.

DUA. Korespondantoj kun Arhangelsko kaj SAT-anaro ne forgesu sendi salutlet. al 11-a jubileo de la Oktobro.

Erjuhin Aleksandro, **Arhangelsk** (9682).

DISKUTEJO

Pri korespondado

En "S-ulo" n-o 199 mi legis opinion de K-do P. Tilin (9310) pri korespondado. Li laŭ mia opinio ne pravas. Mi konsentas kun li, ke korespondado estas bona ilo por sin perfektigi, sed estas malbona afero, interkorespondigi lernantojn, kiuj ankoraŭ ne bone scias la lingvon. Certe, K-do Tilin proponas, ke ĉiuj leteroj de lernantoj estu antaŭe severe korektataj. Sed ĉu tion instruanto povas fari, se li havas 20 aŭ pli da gelernantoj? Estas neeble por li plenumi tiun laboron. Ĉu do li permesu forsendi erarplenajn leterojn? Certe ne! Kiam lernanto komencas korespondi, li almenaŭ devas koni la esp. gramatikon. Tiam la korespondado povos utili al li en la senco de pliperfektigado. Antaŭ la korespondado la instruanto paroligu siajn lernantojn, farante kun ili komunajn ekskursojn, promenojn, kaj parolante esp-e kun ili pri naturo, politiko ktp. Tiel la lernantoj rapide progresos kaj akiros baldaŭ kapablon k lerton en la uzo de la lingvo. Nur tiam estos ĝusta tempo por ili, serĉi korespondantojn en eksterlando. (12 926)

Red. noto. *Certe interesos niajn legantojn ekscii, ke la aŭtoro de ĉi supra artikoleto (K-do el Hispanio) devis haltigi sian korespondadon, ĉar liaj gepatroj tute ne volas, ke li lernu esp-on k multfoje eĉ kuraĝis bruligi liajn ricevitajn leterojn dum lia foresto de hejmo. Malgraŭ tio li senlace laboras instruante nian lingvon k samtempe varbante novajn SAT-anojn.*

LETERE
partoprenu nian komunan feston

7. XI. 28 okaze de XI. datreveno **de l' Oktobra Revolucio,** sendu viajn k de viaj proletaj organizoj salutleterojn publikigotajn en gazetaro de Mezvolgalando k de Samara-Zlatousta fervojo, en festaj manifestacioj k kunvenoj. Resp. 7. XI. 28 sekvos.

Adr.: USSR, **Samara,** Uralskaja, 29, kv., 3, al Jeleznjakov Bazilo.

ĜUSTIGO

K-do Eruŝkovskij Johano (aktiva SAT-ano 10 137), forveturinte el Kutais, sciigas sian novan adreson k serĉas seriozajn gekorespondantojn el ĉl., L, Pl. Sovetio, **Tiflis,** Engels-str. 36-a.



Ĉu vi jam konas la plej bonkvalitan klingon

ESPERO?

Ĝi posedas eksterordinaran tranĉkapablon. Ĉiu fariĝu revendisto!

—o—

Al ĉi lastaj mi liveras afrankite 1000 klingojn por 54.— mk. germ.

A. Reul, Würselen b. Aachen, Germanio

NIA POŜTO

5323. — Ni ne povas ĉiam enmeti ĉion bonan, kion ni ricevas. Via artikolo pri klerikalismo en P. estas tro longa k cetere pri tiu temo jam aperis en aliaj artikoloj. "Psikologio"... ŝajnas al ni tro malfacile komprenebla por "L. L.". — Vian atentigon pri viaj tradukoj el M. notis la Red. Vi ne devas senkuraĝiĝi pro tio, ke ne aperas ĉiuj viaj verkajoj. Bona verkisto devas trovi rekompencon en la verkado mem k ne en la aperado de siaj verkoj. E. L.

8404. — Alvenis via letero — por kiu ni devis pagi 1.80 fr. kiel punafrankon. Loko absolute mankas por publikigi la demandaron de K-do 12 667. Cetere inter niaj legantoj estas relative malmultaj ministoj. Sufiĉus do multobligi la demandaron k sendi al interesiĝantoj. Anonco pri tio en "S-ulo" povus utili. Koran saluton! E. L.

1188. — Tro longa; aperos kiel felietono en okazo de bezono. E. L.

5893. — Tiajn anoncojn ni ne enmetas senpage.

Kolektivano. — Ni uzos laŭpove vian materialon. Jam eksciu tamen, ke via eksterordinare longa rakonto pri "eksterordinarajoj" ne povos trovi lokon pro ĝia troa amplekso. E. L.

6600. — "A. k S." aperos je konvena tempo. Estu certa, ke ni ne flankenmetos ĝin. Por "For la mil." loko mankas.

11 836. — En n-o 205 vi trovas kelkajn konsilojn por JP. Mi ne povas individue resp. al ĉiu. Pri progreso de la Sekcia laboro ni rap. en "S-ulo". Serĉu koresp. per "S-ulo". Plej ofte ne estas konsilinde apartiĝi. Sed tio dependas de lokaj cirkonstancoj. N. B.

H. Ponjatovskij. — Via anonco estos 7×6 cm. kaj aperos 2 foje. Se vi deziras kvarfojan enpreson vi denove devas sendi 5 rubl.

5364. — Pri la kongreso en Leipzig vi baldaŭ legos en "S-ulo". Jes en Göteborg estis K-doj el Sovetio.

10 099. — Ĝis nun ni ne aŭdis, ke nia movado estas tie malpermesita.

11 740. — "Bildoj el la germana revolucio" estas ĉe ni haveblaj. La aliaj ne plu ekzistas.

3641. — Tiajn anoncojn ni enmetas nur kontraŭ antaŭa pago. Po kv. cm. kostas 6 kopekojn. Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do A. Teufelsbrucker ĉe Klaushofer, Schubertstr. 6, Steyr, dez. koresp. kĉl., precipe kun ekstereŭropanoj, L, PI.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Walter Hansel, Mariengasse, 256, Neu-Röchlitz, dez. koresp. kĉl. L, PI, PM. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do Jarko Hošek (ĝis nun Hodonin, Horni ples. 3), Svépomoc, Zlin. — Korektu en la Jarlibro!

K-do Josef Schweinfurter, Holeischen, 213, kore dankas al ĉiuj, petantaj lin pro koresp-adon k PM-interŝanĝado, petante samtempe pardonon, ĉar li havas jam tro da koresp-ado, superanta lian mallarĝan monujon.

FRANCIO

K-do Gabriel Legry, La Chaise St. Florent (Cher), dez. koresp. kĉl. pri div. temoj.

GERMANIO

K-do A. Bierbaum, Untere Aktienstr. 12/3, Chemnitz i. Sa., dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo k movado. Certe resp.

K-do Gerhard Nokiel, Salzgasse, 4, Hirschberg i. R., dez. koresp. kĉl. L, PK, PM, PI. Resp. garantiata.

K-do Willi Bierbaum, Rudolphstr. 11, ptr., Chemnitz i. Sa., dez. koresp. kĉl. PI, PM, bfl. Resp. garantiata.

K-do Max Wetzel, Theaterstr. 23, Glauchau i. Sa., dez. fruktedonan koresp-adon kun jurnalistoj k spertaj esp-istoj el ĉl.

Aresŝanĝo. — K-do Paul Förster, Kirchstr. 7, Neurode i. Schl. (antaŭe Kirchstr. 5). — La sama K-do dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl. Ĉiam k akurate respondos.

HUNGARIO

— 8 Gek-doj dez. koresp. kĉl., precipe kun ekstereŭropanoj. Adr.: K-do Ladislao Kraussz, Horthy Miklos-ut. 42, Budapest.

JUGOSLAVIO

K-do Franc Homar, Bos. Brod, dez. koresp. kĉl., krom Sovetio pro severa teroro, PI, bfl.

NEDERLANDO

— Kelkaj anarkiistoj dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., precipe kun teror-landoj. Adr.: K-do P. C. Klijn, Dapperstraat, 123, sous, Amsterdam.

PORTUGALIO

Adresŝanĝo: K-do J. P. Barreira nun havas novan adreson: (vidu Jarlibron, pĝ. 211 a). Petas pardonon al siaj gekoresp-antoj pro longega silentado, kaŭzata de malfavoraj privataj cirkonstancoj.

SOVETIO

K-do M. Ŝapirovski, Puŝkin-str. 45/14, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl. pri lab. movado, IRH, kom. infan. movado ktp. L, PK, gaz.

— Komjunula ĉelo de "Panfabriko", Ĥlebozavod, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl. komjunuloj, pri ĉ. demandoj de rev. mov. k lab. vivo. Resp. garantiata.

Moskvo 19

UL. FRUNZE, 18
Moskva Komitato de SEU

Ĉiu liberpensulo, IRH-ano, junkomunisto, sportulo, fotoamatoro kaj aliaj fakanoj, sendintaj leteron al supre citita adreso

nepre havos

garantiitan de l' Komitato samfakan korespondanton aŭ peranton laŭdezire.

Neniam prokrastu!

K-do V. Kotelevcev, str. Bogdanovskij per 14, Ĥarkovo, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri lab., profesia k radiista movadoj. L, fotoj, PI, naciaj gaz. Nepre resp.

— Laboristoj de la mondo skribu pri profesiaj, laboristaj k kulturklerigaj temoj laŭ adr.: Okr. Prof. Sovet (Profesia sindikato), Kulturfako. (Kultprovsovet) — Esperanto-Oficejo. Dvorec Truda (Palaco de laboro) loĝ. 63, Ĥarkovo, Ukrainio. Oni tuj resp.

K-dino Tonja Vesnina (20 j., dramrondetanino lernas kantadon), Nekrasovskaja, 137, kv. 31, Samara, dez. koresp kĉl. por sin perfektigi en esperanto.

K-do Gregoro Ŝmelkin (konstrulaboristo), str. Borohova, 40, 11, Kiev, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do P. Leonĉukov, str. Gerŝuni, 49, 17, Kiev, dez. koresp. kĉl. pri literaturo, L, PI.

K-do Viktoro Fallin-Stroganov atentigas siajn koresp-antojn pri ŝanĝo de la adreso, nun ĝi estas: Smolensk, Provorskaja ul. 8-a, antaŭe en Leningrad. Korektu en Jarlibro.

Adresŝanĝo. — K-do A. P. Lanovenko, St. Kaŝperovka, Jugo-Zapad. ĵel. dor., Ukrainio (antaŭe Tetiev, Kiev. gub.). Korektu en Jarlibro.

K-do V. Demidov, ul. Fokina, 74, Brjansk, dez. interŝ. PM, kĉl. Resp. garantiata.

— Mi serĉas seriozajn koresp-antojn ĉl. por nia klubo k organizoj. Estas tre dezirataj koresp-antoj el ĉeloj de IRH, kom. junularo k ruĝfrontanoj. Adr.: K-do Edmondo Ĉiĥaŝov, Arseniĉevastr. 31, Kamenskoje, Dnepropetr. distr.

K-do N. Hapanoviĉ, Pjeski-Krutaja, 4, Kamenskoje, Dnepropetr. distr., korespondas kĉl. Resp. garantiata.

K-do S. Epŝtejn, Pjeski-Stroitelnaja, 4, Kamenskoje, Dnepropetr. distr., korespondas kĉl. Resp. garantiata.

K-do V. Kamjenecki, Verĥkolonija, 12, kv. 7, Kamenskoje, Dnepropetr. okr., dez. koresp. pri enlanda vivo k junular-movado.

K-do Belogorcev, Ukrainio, Nikolaev, Zavod "A. Marti", Esperanto, dez. koresp. kĉl pri politiko, lab. vivo k movado, peras kolekt. koresp-adon. Resp. garantiata.

K-do Agr. A. Romanjuk, Andruszowka, Berdiczewskij okrug, Ukrainio, dez. koresp. pri agrikulturo k a temoj kĉl, gaz., ĵurn., PM. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do E. M. Flejs, Redakcia gazeti "Priirtiŝskaja Pravda", Semipalatinsk.

SVEDIO

K-do Axel Eriksson, Egna Hem., Karlsborg, dez. koresp. kĉl. pri esp-aĵoj, PM.

SVISIO

— Lab. Esperanta Grupo, 6, Rue Terreaux du Temple, Genevo, dez. koresp. kun Gekdoj aŭ grupoj ĉl., nur pri soc. k politikaj temoj.

ENHAVO:

	pâĝo
La faŝisma edukado	1—2
Iom pri la kooperativa movado en Svedio	2—3
Hodiaŭ en Bulgario	3
En la batalo pro la mondmerkato	3—4
Semajno el mia vivo	4—5
Ĉu ĉiam estis sklavo la virino?	4—5
Diversaĵoj	5
Tra Esperantio	6—8
Anoncoj, Korespondado	7—8

Preselo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)